



LaSuda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 128 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. Februaro 1931.

ANDREE STORY IN ESPERANTO Covers Civilised World.

Flying to the Pole in 1897 was a much more dangerous undertaking than it is now. Wireless, of course, was unheard of. The more meritorious, therefore, is the courage of the Swede Andree, and his two companions, who in that year attempted to reach the North Pole.

In Sweden Andree has become quite a mythical figure. In song and story his countrymen have, for the last thirty years, talked of the hero who flew towards the North Pole and was swallowed up.

Then, some six months ago, a Norwegian scientific expedition chanced on the place where Andree and his companions slowly perished. There also they found the famous diaries, so that one can now follow the doomed men day by day, hour by hour, first in the balloon, then in their struggle against ice, snow and Arctic seas.

When it was blazed abroad that Andree's last camping place had been discovered a sensation ran through the civilised world, for up till then that first air voyage had been wrapped in impenetrable mystery. The intense public interest called for a complete description based on the notes made by the actors in one of the most dramatic enterprises of modern times, so, on 25 Nov., appeared the complete story in eleven languages, one of which was Esperanto. The publishing of the work in the interlanguage has made it possible for Esperantists in over 70 countries to translate it into their tongues, even into Malayan or Icelandic.

This Esperanto translation was made by Stellan Engholm, the young Swede whose original novel "Al Toriento" received admiring comment from over thirty countries. It has over 400 pages,

and 115 photos which are unique in that they were rescued from polar ice in which they had lain for 30 years. Only the careful attention of a photographic scientist enabled them to be developed.

To finger the pages confirms the impression on the eye of the volume's combined elegance and solidity. One will find in them not only a vivid description of a hazardous exploit but also much valuable scientific information garnered by the ill-fated expedition. In Sweden the first edition (30000) was sold the first day.

The price of the Esperanto edition (10/- paper; 12/6 board, 6d. post.) is cheaper than the Swedish edition. The English costs 21/-. Publishers are the Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1. Order through B.E.A.

ESPERANTO ON THE MARCH.

Since our last issue we have learned:

That the first vol. of a series of Esperanto guide-books published under the ægis of the powerful Italian Touring Club, "Milan and the lakes of Lombardy," is almost ready. It will have 120 pages, 8 maps and 9 colored plans.

That Miss Odette Piau won the Esperanto type - writing competition in Paris. In a five-minute test she beat 29 competitors. Her strokes totalled 2,099.

That there are over 200 Esperanto-speaking tramwaymen in Stockholm.

That the municipality of Bratislava (Czecho-Slovakia) has named a street after Zamenhof.

That Esperanto has been introduced into the trade schools of Linz (Austria). Some 350 pupils are learning the language. Salzburg will follow.

That a plate honoring Dr. Zamenhof has been set into the wall at the corner of Piotrkowska and Zamenhof streets

in Lodz (Poland), as a mark of esteem from the town's citizens.

SATESPRIMO SATATA.

Por nia modesta entrepreno venis nepetite la jena karto el Parizo. Ĝia kelklinia enhavo vere kuraĝigas, kredigante nin, ke la S. K. nutras almenaŭ iomete le penson al la ĉefa kontrolinto de la komuna lingvaĵo ĉe la Plena Vortaro, la kompilinto de la valorega Franca-Esperanta vortaro kompleta, k.s. verkoj.

15/12/30.

Altestimataj Samideanoj.

Denove dankante al vi pro la afabla regula sendado de La Suda Kruco, kiun mi ĉiufoje legas kun aparta intereso kaj plezuro, mi petas, ke vi bonvolu notii mian translogigon. Mia adreso estas nun: 7 rue Bonaparte, Paris 7.

Kore via

Prof. E. Grosjean-Maupin.

KRONIKO.

Brisbano (Kvislando):— Kvankam mankis raportoj, la Brisbana societo estas en lastatempo sufiĉe agema.

En la Metodista preĝejo de la antaŭurbo Wilston oni prezentis propagandan koncerton, dankon al la klopodoj de nia ano sinjoro W. Baker, kiu mem faris paroladon pri nia afero. Fraŭlino Rose Macpherson deklamis "Ho, Mia Kor'", kaj antaŭ la deklamo membro legis mallongan tezon de sinjoro Klement Kidd pri la deveno de la poemo. Sinjorino Vitoŝinki faris nelongan paroladon en Esperanto pri Esperanto, kiun tradukis laŭfrazo ŝia edzo; kaj ŝia kelkfoja nekontento pri la traduko ne malplaĉis al la aŭdantaro. Poste sinjoro Vitoŝinski parolis angle pri religia kaj socia vivo en Ruslando. Aliajn kantojn kaj deklamojn faris en Angla aŭ Esperanto sinjorino T. Benussi kaj fraŭlino Grace Brown. Akompanis la kantantojn fraŭlino Gertrud Carrick.

Por monhelpi la societon, oni aranĝis, laŭniate de nia ano sinjoro S. L. Parry, en la Kumalong-klubo, du dancojn, kiuj alportis notindan profiton.

Pri nia Zamenhoffesto, bonvolu legi apartan raporton.

Melburno, Vik.—Ĉe la Esp. Klubo merkredon, la 14an de jan-o. s-ro Hussey, en ridanta humoro, priparolis sian vojaĝon al Oksfordo. Li akcentis fakton, ke la lingvaĵo de la Esp-aj prelegistoj ĉe la Somera Universitato estis por li ĉiam facile komprenata, eĉ tiam,

kiam la fakuloj pritraktis la plej profundpensajn tezojn, kia ekzemple tiu de prof. Migliorni pri la komplikajoj de l' modernaj lingvoj, aŭ tiu de la muzikisto prilumanta la "nekonatan Mozart." S-ro H. laŭdis fortadmire la instrumentodon de pastro Ĉe, kiun li nomis vera miraklisto Esperantistiganta. Ĉe Oksfordo la rumano, post nur momentoj, jam paroligis Esperanton al tute ne-esperanta publiko, ne uzante eĉ vorton anglan! S-ro H. diris, ke tremvibroj de vera fiereco trakuris lin, kiam li devis traduki antaŭ fremduloj la vortojn sur la ŝtono ĉe la tombo de Shakespeare, kaj tiujn en la dometo Hathaway. Unu franca s-ino, post plezura tempo sub la afabla gvidado de nia sam-o, koleriĝis akre pro la loĝarangon en Oksfordo, kaj rapidis for en sialandon, figure sputante sian malplaĉegon. Bedaŭra afero, pri kio ni kulpigas la francan temperamenton.

S-ro H. flugis al Koln (3½ horojn), kaj tuj falis en veran inferon de malkomprenebleco. Germana lingvo ĉie. Pere de UEA libro li atingis akompane de s-ro Pyke s-ron T. Jung ĉe Heroldo. Ĉi tiu aferoplena bonkorulo prete ekiris kun ili por uzi plezure la posttagmezon. Ĉe la Kolna klubo ili rimarkis la biertrinkadon kaj la hejmiron brak-enbrakan je la 1.30 matene.

Malgraŭ la ofta diro, ke la anglan oni komprenas, eĉ parolas, vaste en Berlino, s-ro H. trafis tie nur malfacilegon pro sia nepovo uzi la germanan. Resto dusemajna ĉe riĉkora germana familio donis ĝuplezuron nur pro la Esperanteco de la du filoj. Gepatroj sidis mute, sciigante pri la aŭstralia vizitanto ĉiam pere de la fila traduko. Al Jena, Stuttgart, Lucerne, Geneva, kie li vizitis la faman bibliotekon de interlingvo ĉe UEA, Parizo, kie denove langa paraliziĝo trafis sur lin. Efika kuracisto estis finfine trovita Esp-istino franca, ĉe kiu li feliĉe regajnis sian aplombon kaj rajtan dignon. Tiam al Londono kaj ties klubo, kie oni nepre paroladas nur Esperanton, kaj tre bel-flue.

La paroladintón la anoj kore aplaŭdis pro lia bonhumora rakonto.

Wellington, Nov-zelando.—La Esp. klaso rekomencis la 27 Januaro sian funkciadon por la jaro 1931 post mallonga interrompo dum la festtagoj. Alian sukceson plenan jaron!

La 30 Decembro, per la vaporŝipo "Makura" foriris al Filadelfio, Usono,

la familio McGuigan. Bedaŭrinde, per tio la N.Z.E.A. perdis tri el siaj anoj estimataj, kiujn multaj memoros kiel gepartoprenintojn en la Unua Esp. Kongreso (Wellington, Januaro, 1930). Al ili prosperon en nova lando.

Zamenhoffesto en Brisbano.

Vere brila sukceso estis la Zamenhoffesto de la Brisbana societo en la kafejo Ann Hathaway en 15-a de decembro. Ĉeestis kvindekda samideanoj kaj amikoj, kaj regis gajeco kaj ĝuo. La sukceson oni dankas al la laboro de la sekretariino, fraŭlino E. B. Carrick kaj ŝiaj helpantoj.

Post vespermangxo ĉe ornamitaj tabloj kun menuoj en Esperanto, oni aŭdis per radio paroladon de la prezidanto (sinjoro Hyde) el la ĉefa radistacio 4QG. Sekvis bona programo de kantoj kaj deklamoj, ĉefe en Esperanto, kaj instrumenta muziko. Notinda estis la deklamo de propra originala poemo (en Angla) de fraŭlino Rose Macpherson pri la vivo de Zamenhof.

Oni donis premiojn al la lernantoj de la kursoj; kaj al fraŭlino Carrick, kies energio kaj senfina sindono estas la ĉefa risorto de la societa agado, la anoj donacis belan vitran horloĝon.

Poste oni dancis.

Bonaj raportoj aperis en ĉiuj kvar taggazetoj.

COBURG'A ESPERANTO-KLUBO. (vidu No. 115 S.K.)

Septembron 1929 oni fondis la Coburg'an E. Klubon. S-ino Anne C. Hintze, tiame prezidanto de la Coburg'a filio de la Aŭstralia Laborista Partio, ricevis permeson tiucele uzi ties ĉambregon kaj senpagan lumon, sed ĉar aliaj kluboj uzis la ĉambron, estas eble nur ĉiun duan jaŭdon tie instrui, kaj pro tio lerneĵ-estro s-ro Wilson disponigis al ni kunvenejegon en ŝtatinstruejo. Tiu arango daŭris ĝis dec. 1930. La instruantoj estas: S-ro G. Burns, D.B.E.A., hon. sek.; s-ro A. Spencer, s-ro C. Shanahan, s-ro N. Perkins, D.B.E.A., kaj s-ino A. Hintze, de la Melb. Klubo. S-ro Perkins meritis riĉan dankon de la Coburg'a klubo pro sindona instru-servo. Jam de starigo ĝia, li vojaĝas al ĝi de Clifton Hill por gvidi kursanojn. Senlaboreco forpelis el Coburg kelkajn anojn, malgraŭ tio ĉi dudekok lernantoj ĉiusemajne kunvenas — tre kuraĝiga por la gvidantoj. Tre interesajn fotojn, p. kartojn kaj gazetojn ricevas la lernantoj el alilando. El la

gazetoj, la "Sennaciulo" estas precipe interesa. Estontece la klubo kunvenos ĉiun jaŭdon ĉe la Laborista Halo, Sheffield-str., Coburg. Bonvenon al ĉiuj, kiujn Esperanto interesas.

KORSALUTON

al F-ino Coralie Smythson, Vic-prez. de la Wellington'a (N.Z.) Esperanto Klubo, kiu antaŭ ne longe trapasis kun honoro la por-diploman ekzamenon de la B.E.A. — imitinda ekzemplo, kiun, espereble, sekvos ĉiu lernanto de ŝia klubo.

EDZIGO

Mumford—Sinnotte.—Je la 25a de decembro, 1930, fariĝis geedzoj en la Preĝejo de la Sankta Triunuo, Okcidenta Melburno, William, unuenaskita filo de la estintaj gesinjoroj William Mumford; kaj Edith Alleyne Sinnotte, due naskita filino de la estintaj gesinjoroj Walter Powell Sinnotte. Faris la solenon lia kanonika moŝto doktoro Crotty.

"MONDA LIGO"

Korespondu kun Esperanto-parolantaj membroj en ĉiu mondparto!
Interŝanĝu P. markojn, P. kartojn, Librojn, k.t.p.

Aliĝu al nia tutmonda ligo!
Informojn donas C. A. Wittenbach,
19 William-str., Richmond, E.I.,
Victoria, Aŭstralio.

TO OUR SUPPORTERS.

We again express our thanks. There is, however, a large amount of subscription money still outstanding. May we again ask all who read these lines, and who at the same time are doubtful of their soundness to the Suda, to regard it as a personal appeal to bring themselves into line with those who are battling to bring the paper through a difficult time.

S-ro W. Holloway, 4/6, feb., '32; s-ino Purnell, 5/- (por d-ro Bennie) dec., '31; s-ro C. Wittenbach, 4/6, dec., '31, kaj 2/6 anonco; s-ro E. M'Kenzie, 10/- donaco; s-ro J. Parker, 4/6, nov., '31; vendo per s-ro Cox, 1/-; same per f-ino Griffin, 1/8; s-ro R. Heyden, 4/6, jan., '31; s-ro E. Hynd, 4/6, jan., '31; s-ro L. Illingworth, 4/6, dec., '30; f-ino Blyth, 21/- donaco; s-ro S. Clarke, 4/6, jan., '32, kaj donaco 2/6; s-ro P. Paris, 5/-, dec., '31; s-ro A. Davern, 4/6, jan., '32; W. Middleborough, 5/6, sep., '28. Ensume: £4/10/-.

KURSO PER TRADUKADO
(kondukata de s-ro G. Gordon,
F.B.E.A.; sek-iino, f-ino Blyth, 10
Victoria-av., Surrey Hills, Melb., E.10.)

TRADUKO 15

KAPITANO CHARLES STURT
—aŭtoro kaj landesploristo (daŭrigata)

Veninte (1) al Laidley's (pron. lejdliz) Ponds, Sturt la dek-unuan de Oktobro sendis subestron (2) Poole al proksimaj montoĉenoj por esplori rigardi la terenon. La konsternantan sekvon de tiu ago oni vidas en la jena elтираĵo el unu letero de Sturt:—Morgaŭ ni ekmarŝos al la montoĉenoj kaj la akvoj—la nekonataj akvoj, sur kiuj neniam naĝis boato kaj super kiuj neniam flirtis flago. Poole diras, ke tiu maro estas (3) intense blua.—Tamen tio, kion vidis Poole estis nur fata - morgano (4). Seniluziiginta (5) sed ne senkuraĝiginta (5) Sturt pluenmarŝadis kaj kampis (6) en valetto, kies nuna nomo estas Sturt's Depot (pron. depo) Glen. Sturt skribis:—Ni marŝis laŭ ĉiu rivereto kaj eksploris la regionon en ĉiu direkto, kaj ne ĝis tiam mi konstatis la veron, ke ni estas (3) enfermitaj en varmega, dezerta regiono tiel efektive, kiel ni estus, se ni travintrus ĉe poluso. Dum (7) ses malgajaj monatoj la esploristoj restis malliberigitaj ĉe Depot Glen. Ĉiaj bestoj malaperis. Sovagulo mistere aperis kaj egale mistere malaperis. Poole mortis, Browne kaj Sturt terure suferis de (8) skorbuto. Pluvoj en Junio liberigis la ekspedicion, kiu de tiam marŝis tra kuraĝiga regiono, ĝis subite baris (9) al ĝi la vojon vasta, ŝtonplena dezerto. Post tio Sturt sekvis rivereton, kiun li nomis Eyre's Creek (pron. ejrz krik), sed ĝi finiĝis en la dezerto. Senkuraĝiginta (5) Sturt sin turnis returne por esplori laŭborde de rivereto, nun nomata Cooper's (pron. kuperz) Creek. Denove mokis lin la dezerto. Sufoka varmega kaj nesufiĉeco da akvo devigis, ke la ekspedicianoj iru returne al Depot Glen. Ili senprokraste faris akvosakojn el bovaj feloj, kaj la malsukcesinta ekspedicio ekpenegis sin liberigi. Sturt perdis la korpoforton kaj vidkapablon, kaj tial (10) devis veturi sur ŝarĝveturilo. La dudek-unuan de Decembro la ekspedicio atingis sendanĝeran lokon, kaj tie finiĝis (14) la lasta esplorvojaĝo de Sturt.

Sturt, ankoraŭ ne taksata (5) laŭ sia merito, reveturis Anglujon (12). Nur kiam li kuŝis sur sia mortlito en la jaro mil-naŭcent-sesdek-naŭa li ricevis

la nesufiĉan rekompencan—titolon de kavalireco. Post lia morto lia vidvino per gracia permeso tenis tiun bagatelajojn (15). (Fino).

NOTARO 15.

1. Adverba participio, Cox 211.—2. "Poole," Kiam titolo en akuzativo antaŭiras personan nomon, ne estas necese doni akuzativan finiĝon al la nomo.—3. "estas" ne "estis." Notaro 13/14.—4. "mirage"; fata-morgano estas Zamenhofa vorto. Fab. de And. vol. 1, 75/6.—5. La adjektiva participio ĉi tie esprimas la staton de Sturt. Antaŭ ĝi oni subkomprenas "estante."—6. "kam-pi," to camp. Plena Vortaro de Grosjean-Maupin.—7. "Dum" aŭ "en la daŭro de."—8. "de" aŭ "pro."—9. Notu la frazkonstruon kun aktiva formo por eviti kunmetitan verbtempon (estis barita).—10. "tial," for that reason, ne "tiel, ke," in such manner that. Ofta eraro de iuj verkistoj.—12. aŭ "al Anglujo." Cox 67 (2). L.R. pĝ 74.—14. Vidu noton 9. Neniam uzu "konklud" en la senco de "fin".—15. Mi ne scias, kion la aŭtoro volas komprenigi per la fina frazo.

KORESPONDAĴO.

Omooto: "The People of the Abyss" bone tradukiĝis per "la homoj de la (socia) fundo." Laŭvorte, "la popolo de la abismo."

M.B. en L. Mi legis kun vera intereso vian studindan verkaĵon pri la verbo "devi" en Kristana Revuo (Dec.) sed honestadire mi ne povas en la nuna tempo plenumi la cetera plezuratan taskon, kiun vi fide almetis al mi.

Tipisto: Odette Piau, la ĉampionino, "tipis" po 69.9 vortoj en ĉiu minuto.

I. S. en Sy. Vian faskon da literaturo sur ĉielarkokolora papero, ambaŭflanke skribmaŝinstampita oni konsideras. Komence pikis tento forĵeti la tuton, sed verdire vi verkis liniojn sufiĉe legindajn. Penstreĉa laboro frontas jam aferplanan red., kiu devos ofere dediĉi tempon reskribi ĉion eventuale presotan. Kial Esp-isto jam de 20 jaroj ankoraŭ ne lernas, kiel prezenti bonorde materialon al redaktejo? Tamen dankon por ĉio.

In Condolence.

With sincere regret we record the passing of two of our readers and fellow-workers, Mr. F. T. Hepworth, of Canterbury, and Mr. J. Widdowson, of Rockdale, Sydney. To those bereaved we express our sympathy.

Heraldo de Esperanto

AMPLEKSA, AKTUALA, ATENTOTENA, SEMAJNA GAZETO, CIRKULAS EN SEP KONTINENTOJ.

Petu specimenon de Brusselerstr. 94
Koln, Germanlando.

Hofman in Derby (W.A.)?

We have received from s-ro Heinrich Hofman, Bohm-Leipa, Sonnen-gasse 235, an inquiry as to the presence in Derby of anyone by the name of Hofman, who left Germany some years ago. Would our Perth friends kindly arrange for a search to be made in the general directory.

PRI LA STILO.

Interesaj estas la linioj pri (vidu la recenzon pri "Viktimoj") la stiltendencoj en Esperanta literaturo. Laŭ mia opinio niaj "modernaj lingvo-evoluigistoj," "vortjonglistoj," tielnomataj "stil-majstroj," povas fari grandan malutilon al nia afero, pro sia aminklino tro simigli la lingvon al ia hina cerbumigilo.

Preskaŭ ĉiuj Esperantistoj deziras legi Esperanton tiel facile, kiel sian nacian lingvon, kaj se ili trovas tekston kvazaŭ enigmo solvenda, ili aŭ ĵetas ĝin flanken aŭ nur enue rapide trakuras per la okulo disajn partojn. Tia estas mia kutimo, kaj pli ol unu fojon mi disŝiris libron, por ke ĝi ne malutilu al nia kara lingvo. La spirito de Esperanto estas simpleco. Mi opinias, ke la Esperanta gazetaro ne faras sian devon, ne severe recenzante verkojn, kiuj deflankiĝas de la ĝusta vojo.

Tre prefere mi sorbas kun facileco ian glate verkitan rakonton de s-ro Luyken aŭ tradukaĵon de s-ro Eggleston, ol mi pene luktas malimpliki la fantaziajn fraztordaĵojn kaj vortmonstrojn tro ofte trovatajn sur la literaturaj paĝoj de niaj gazetoj.—Simplulo.

HOMOJ DE LA SOVAĜEJO

kaj iliaj fidelaj hundoj.

el "The Sun" (Sydney) de la 1a de Majo, 1926.

El la Angla lingvo tradukis George Gordon, F.B.E.A.
(2a Parto)

Tiu kortuŝanta anekdoto pri Spider estas unu el sennombraj historioj, venintaj el la Aŭstraliaj sovaĝejoj, pri inteligenta kamaradeco inter homoj kaj hundoj. En tiuj vastaj, silentaj regionoj de eŭkaliptoj homoj ofte parolas dum horoj al hundoj kun tiel sama respekto kiel al homa kunulo. Ofte homo

kaj hundo kune sin trenis kaj trotetis lacigajn mejlojn, kune kuŝis ĉe bivakaj fajroj, kaj hundaj oreloj rekte ekstarantaj kaj akrevidaj okuloj avertis pri kaŝita danĝero en la mallumaj interarboj. Kune ili spertis prosperecon kaj malprosperecon, kune ili baraktis tra pluvo kaj koto kaj ŝanceliĝante kaj spiregante marŝis sub kruela suno laŭ senfinaj ruĝpolvaj vojstrekoj.

La hundo, kiel ajn estu ĝia nomo, ĉu Spider, aŭ Bluey, aŭ Spot, aŭ Dick, aŭ Jack, aŭ Brownie aŭ Smokey (6), havas honoran lokon en la kronikoj de la vojaĝado de la "swagman." Se iu senkonsidere parolas malrespekte pri ĝia raso aŭ reputacio—jen! tuj surtutoj kaj ĉapeloj estas deĵetataj kaj pugnobatalo ekfuriozas. Malantaŭe de Bourke la plej facila maniero por inciti al pugnobatalo homon de la sovaĝejo estas paroli malrespekte pri lia hundo.

En la solecaj sovaĝejoj de ĉiu ŝtato se "swagman" devas nedaŭre foresti, li fidplene konfidas al sia hundo la gardadon de la bivakejo. Malofte la hundo pruviĝas nefidinda. Sennombraj hundoj ĉe sennombraj bivakejoj haltigis nekonatojn en tiu rondo, proprigita al la mastro per la tieesto de fajro, "billy" (7) kaj kelke da lanaj litkovriloj. Nekonato povas enpaŝi en tiun neŭtralan rondon, sed ne povas eliri returne ĝis la reveno de la mastro. Se li faras paŝon por foriri, tiuj viglaj okuloj ekflamas, rozkolora lango elĵetiĝas interteruraj dentaroj kaj la hundo minace sin pretigas por atake eksalti.

Altaj inter la hundoj de la sovaĝejoj pro siaj inteligento kaj fideleco staras la Spot'oj, la Dick'oj, la Jack'oj, la Smokey'oj, la Brownie'oj kaj aliaj, kiuj estas gardistoj de tirbovoj. Iliaj lertaĵoj plenigus libron por amantoj de bestoj. Hodiaŭ sur la okcidentaj ebenaĵoj troviĝas hundoj, kiuj laboras ĉe tirbovoj je preskaŭ mistera scio kaj kapablo. Ofte el milo da tirbovoj la mastro volas jungi eble tridek. La cetero eble estas bovoj apartenantaj al aliaj homoj. La du bovoj por la antaŭo de la jungaĵo estas elpelitaj el la milo kaj jungitaj, kaj estas la tasko de Dick aŭ Bluey aŭ alia hundo kolekti la ceteron el la tridek. Ĝi plenumas la taskon kun kapablo, kiu impresus ĉe Henry Ford'on. Ĝi elpelas la bovojn "Ranger" (8) kaj "Red" el arego da sin paŝantaj bovoj, poste "Snowy" kaj "Roany" (8) kaj la ceteron el la jungotaro kun senerara lerto kaj neniam bovon neapartenantan al la mastro. La rapido aŭ malrapido de la laboro multe

dependas de la humoro de la mastro. Se tiu inklinas ne multe klōpodi, tiam la hundo ne rapidas kolekti la bovojn, sed se la mastro por vigligi ĝin kriegas al ĝi kelke da insultaj kaj malbenaj vortoj, tiam ĝi rapidigas la paŝojn de la bovoj per serio da ekmordetoj ĉe la poplitoj. (9). Per kio ĝi distingas la bovojn de la mastro de aliaj bovoj estas unu el la misteroj de la hunda instinkto.

Lia hundo estas la kunlaboranto de la mastro dum la laboraj horoj sur la vojoj, lia kamarado ĉe la bivako, kaj ofte fariĝas la fidela gardanto de la mastro, kiam tiu permesas al si ripozan ĵempon en kampara urbo kaj plenigas sin je biero. Kiel ofte post kiam la mastro sterniĝis sub la verando de drinkejo, ĝi minace mordcelis ĉiun, volantan aliri la kuŝanton aŭ la "swag" ĵetitan sur la plankon? Kiel ofte ĝi tortimigis tiujn rabemulojn, kiuj, eĉ en kampara urbo, ne hontas turni senhelpan ebrulon poŝ-al-supre kaj kurigi facilmovajn fingrojn inter ties propraj? Kiel ofte la vigla, brua gardomارشado de la hundo ĉirkaŭ la ebria mastro efikis, ke oni portis tiun en la tenejon de fojnhakaĵo malantaŭ la drinkejo, por ke li tie povu per dormo forigi la ebricon, sendanĝera de fingroj de ŝtelistoj?

Fideblaj kamaradoj estas la Bluey'oĵ, la Spider'oĵ, la Smokey'oĵ, la Spot'oĵ.

(1) "claypan" (prononcu: klejpan). Nomo donita, precipe en la seka internolando de Aŭstralio, al malprofunda enprenaĵo en la tero. Ĝi varias laŭ amplekso de kelke da kvadrataj metroj ĝis unu mejlo aŭ pli. La surfundaĵo el argila ŝlimo malakcelas la sorbadon de akvo.

(2) "cotton-bushes" (t.e. koton' arbustoj). Vulgara nomo de Bassia bicornis kaj Kochia aphylla.

(3) "soldat' formikoj," "buldog' formikoj." Vulgaraj nomoj de specoj de atakemaj formikoj de la genro myrmecia.

(4) "swagman" (prononcu: ŝuagman). Homo piede vojaĝanta sur la sovaĝejo por serĉi laboron kaj surdorse portanta "swag"—rulpakaĵon el lana litkovriloj kaj entenantan necesajojn por pieda vojaĝado.

(5) "kelpie" (prononcu: kelpi). Speco de hundoj, deveninta de pariĝo de Skota ŝafhundo kaj la Aŭstralio "dingo" (Canis dingo).

(6) Prononcu: Spuader, blui, spot, dik, ĝak, braŭni, smoki.

(7) "billy" (prononcu: bili). Lada kaldrono ĉie uzata de vojaĝantoj en sovaĝejo por fari teon.

(8) Prononcu: Rejnĝer, red, snoi, roni.

(9) "poplito." Parto de la kruro malantaŭ la genuo.—(Verax).

INTERNACIA LEGOLIBRO.

Redaktis A. Kengott.

Havebla per A.E.A. prezo 50 cendoj

El lando, ne riĉa je Esperantistaj agadcentroj, sed rimarkinda pro fervoro de kelkaj individuoj, venas ankoraŭ libreto de unu tia persistemulo, s-ro A. Kengott, lingvisto ĉe la Universitato de Texas. Kontribuis al la enhavo anoj el kvin lingvoj; la kompilo do ne estas monde reprezenteca. Malestas ekzemploj tipaj de la franca, germana, hispana Esp.-majstroj, jam ne parolante pri malgrandaj nacioj cetere riĉa je niaj talentuloj. Kial ne elspezi iom pli da klopodo, rigide limigi la diversajn lingvanojn je po nur unu peco, kaj per tio ampleksi ĉi tian verkon multe pli riĉe? Ne bone en Internacia Legolibro, ke el 16 kontribuajoj sepo estas el angla lingvana cerbo, kvar el hungara, tri el rumana. Poezion la redakanto iakiale ignoris.

Pritraktojn pri la beleckulturo kaj simila de d-ro K. Mezei legos multaj kun intima intereso. La finlanda aŭtoro de "Antaŭ la Senfino," J. Bergh, majstramane malkovras animojn de du gehomoj frontantaj turmentan morton sur izole flosanta glacipeco. Ilia amo, naskita de komuna danĝero, venkas timon antaŭ la Neniigo. La plej frapa verkaĵo en la volumeto. Kun amara sento oni legas "La Robo," skizon pri malgrandanima filo, hontante sian trivialan naskmedion. Kun libera imago, s-ro Kengott bellingve re-vestas la malnovan legendon, la Lorelei. S-ro Stojan

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiginto, kiu lerte riparas ĝin je malalta kosto ĝis re-

Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

fantazias ediziĝon en jaro 1999. La interagado de la menso kaj la materio estas temo de P. Balkanyi, kiu rakontas pri la potenco de sonĝo sur amajema fierulo.

Entute la lingvaĵo plaĉas; la enhavo daŭre tir-tenas la okulojn. Tamen, ĉu ne atentindaj estas la jenaj: Bonfire Day (festfajra tago); antipati' estas oficiala (131); pflac (?); kosmetik' estas la oficiala radiko. Kial tiuj, kiuj pretendas gvidi nin en internacian unuecon lingv-uzan, ne ĉiam fidele sekvas mem la konsilon de nia Lingva Akademio, esprimantan per ties zorge elektita radikaro de oficialaj vortoj? 73. kemistoj (!); 73/5 haŭto(n); 74 kolorigis lipojn, 75 koloras vizaĝon; 79 terurita (ne terurigita); stivi (ŝarĝi aŭ malsarĝi ŝipon); plombo (nenecesa radiko); palizado (paliso estas oficiala); 95 magistrato devas esti -ano. Glitbastonoj (skioj); rivoko (nuligo); 119 neniĝo (neniĝo); 122, 123, ŝajnis al li, ke li -is (-as); onĝlo (ungo!).

—ROBO.

"POR RECENZO"

Verkita de K.R.C. Sturmer.

Eldonita de la Esperanto Publishing Co. Ltd., London.

Prezo 1/6, 2/6, ĉe B.E.A.

S-ro Sturmer ne havas rakonton per kiu regali legantojn de la supre strange titolita verketo, sed vere per ĝi li ebligas al tiuj, kiuj ŝatas esplori popolmorojn, belan enrigardon en la anglan karakteron kaj en la rilatojn inter la diversaj tavoloj de socia Anglujo. Per travorte konstruitaj bildoj li vipas la "snobismon" (afekta socisupereco), burĝetan hipokriton, kaj bagateleman animon de tiuj gehomoj, kiuj ĵaluze defendas sian pli malpli "neproletarian" pozicion en la socia tekso. Facile diseriĝas amikecoj en tia venena etoso (amata vorto de la aŭtoro), kaj s-ro S., kun penetrema animokulo priskribas la pensojn, intimajn revfadenojn kaj esperojn de kelko da intelektuloj vivantaj en ĝia haladzo. La amiĝa renkonto kaj kuna enmarŝo en gefanĉecon de

Rudolf kaj Filiso estas majstre pentrita epizodaro.

La aŭtoro montras vole-nevole ian influon de H. G. Wells sur sian pensmanieron; la Esperanta lingvaĵo kelkloke indikas, ke la aŭtoro notas v. kojn de Baghy.

7. Obscene (malĉaste, putraĉence); 8. nervoza (nerve interplektitaj manoj. Z.); Ĥinio (Ĥinujo); 16. malgraŭ ioman scivolemon (kial akuzative?); 22. grandaj gutetoj (!); 29. el sian pipon (akuza-tivo nenecese post "el"); 30. umi el la patra monujo (plibone uzi formon kun "log"); 31. super mentono iom antaŭe-nema, sed ne malforta (?); 32. Interese estas, ke la aŭtoro uzas kiel unua "laŭTamiza," "KristalPalaca"; 34. paĝio (vidu Plenan Vortaron); Meksiko (Meksikio); danduljo (dandoj); 42. farinte kion (tion); 55. la hundo venis, la korpon esprimanta eksciton... (kun la korpo...); 58. ni bone instruas ilin pri iliaj lokoj (anglismo? ni...pri ilia efektivita rango?)

Finpaĝe sidas difinoj de "aprezi," "etosoj," "svelta," "evento," "obskena," "oĉjo," "morna." Tiu de la kvina estas diskutinda.—(Robo).

ESPERANTO LERNOLIBRO POR POPOLLERNEJOJ

laŭ rekta metodo verkita de Arthur Degen, laŭ komisiado de la Esp. Asocio Germanaj Instruistoj.

Unua parto (1a-2a lernjaro)

Eld. de Ferd. Hirt, Leipzig.

Prezo 2 rmark.

Ni ne povas tro laŭdi ĉi tiun modele taŭgan instruilon por uzado ĉe la ekĝermantaj Esperantistoj. Malavare ampleksa, riĉekzempla, en manoj de la konscienca lerniganto ĝi estos vere magiobastono por ekestigi la novajn vicojn da praktikuloj, kiuj marŝante portos honore nian standardon eĉ pli antaŭen.

Ĉu ne akcentinde, ke tre prefere devus elekti negermanlingvanoj ĉi tiun libron kiel komenculan studilon? Laborante super ĝi, ili multe pli facile akiros al si stilon liberan de naciismoj kaj laŭvortaj tradukeroj. Kresku inter

PERCY HOLMES

ELEKTRISTO KAJ RADIISTO.

212 NOONE-STR., CLIFTON HILL.

Prezentas al vi novan radi-aparaton. La "VERDASTELO" maŝino estas speciale konstruita por la Esperantistaro, kaj estas havebla laŭ diversaj ampleksoj, kiuj entenas de du ĝis ses valvoj. Aŭskultu ĝin en propra hejmo via!

MEMORU—POR ĈIO ELEKTRA.

Telefonu: JW 4017.

ni la konvinko, ke saĝe estas, ke diverslingvanaj interesang-uzi ĉe la sialandaj lernejoj verkojn de pedagogia valoro kompilitajn aŭ elpensitajn en la internacia lingvo. Per tio la adeptigantoj ensorbos la konojn, tiamaniere ke ili plievoluigos ĉe pli ĝis kontentiga perfekteco la propran esprimspiritojn de l' lingvo Esperanto.

La aŭtoro celas rigoran forpuŝadon de la gepatra lingvo jam de la unua leciono, tiucele li konstruis la komencan ĉapitron laŭeble el vortoj jamkonataj de germanaj infanoj. Tial ankaŭ li ne donas vortareton al ĉiu leciono, sed li ciferezas la objektojn en siaj multaj bildoj kaj en kazoj de iom nefacila kompreno lasas al la instruisto devon mem interpreti la Esperantan vorton, nepre rekonante la gepatran lingvon nur kiel lastlastan rimedon al tiu celo. Dissemitaj inter la ekzercoj, kelkaj kantetoj, dancoj kaj ludoj aldonas ĉarman intereson. Multkoloraj bildoj belarte reproduktitaj karesas la okulojn, kaj elokvente rekomendas al fidele laborantaj preteĥnikistoj.

Sur reklamfolio la eldonistoj presis "intua"; pĝ 3/4 ni vidas "intuicie," "intuigaj." Imitinde estas nepre la Zamenhofa "intuici". Formduoblojn oni devus streĉi eviti, precipe en sama verkaĵo.

Forte bindita el bela papero, la prova libro de Degen meritas vastan disuzadon.—(Robo).

ALL FOREIGNERS LEARN ENGLISH.

This is a favourite reply with unthinking persons who happen to be born in an English-speaking country, when it is suggested to them that the world requires an inter-language. If it is true, one may ask (1) Why so many foreign visitors to England seem to forget their knowledge of its language the moment they set foot on its shores; (2) Why so many English-speaking people try to gain a smattering, at any rate, of one or two foreign tongues when they go travelling abroad, and why there is such a large sale for "useful phrase-books" of the chief languages of Europe; (3) Why any foreign correspondence takes place in languages other than English; (4) Why translation bureaux manage to flourish and (5) Why, at international congresses, there are two, three, or four official

languages?

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, F-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro Johns; Sekretariino, s-ro H. Franks, 38 Worksop-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duanlundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝejo Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots Church Hall, 97 Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbano Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.